



La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

*Senlime*Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française**En cas de non-distribution, renvoyer à**

H. Lentzen

Feldweg 20

BE-4701 KETTENIS

Tel. xx-32-(0)87-55.43.26

E-mail : lentzen@senlime.org**Editeur responsable****Responsa eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: jacques@senlime.org

Esperantista Grupo de Verviers

J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters

BE-4800 VERVIERS

Informatie in het Nederlands**Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: parren@senlime.org

P.H.H. Parren, Heimansstr. 16

NL-6285 AM EPEN

Informationen auf deutsch**Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: hogen@senlime.org

K. Hogen, Auf der Pief 22

DE-52134 HERZOGENRATH

Aperas kvarfoje en jaro kaj**rete elŝuteblas ĉe**www.senlime.org**Prezroj por BE, NL kaj DE :****Unuopa n-ro : 4 EUR****Jara abono : 12 EUR**Bonvolu pagi, prefere antaŭ la
jarfino, **NUR** al la konto :**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de *Senlime*, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.La jara kotizo al *Senlime* (10 €)
estas disigita de la abono al la
papera versio de nia informilo (12€).**ENHAVO :****p. 1 : Esperanto (de nouveau) en Marche****p. 2 : Niaj programeroj lupee****p. 3 : Eŭregiona kalendaro 2012-2013 (1/2)****p. 4 : Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo****p. 5 : Trilanda- kaj Z-festo en Verviers****p. 6 : Verviersa angulo : intégration ?****«Esperanto en Marche»,
votre Revue de l'Association Pour l'Esperanto
a pris du retard... .**

L'«Esperanto en Marche» paraît à nouveau, mais à un rythme plus ou moins imprévisible, alors que «*La Voix d'Amikejo*» poursuit imperturbablement son petit bonhomme de chemin, à son allure de régime.

Nous sommes désolés de ne pas pouvoir prévoir quelles informations seront communiquées à ses lecteurs, ni quand...

Rappelons que notre revue est librement téléchargeable (et reproductible) sur notre site internet à l'adresse suivante :

<http://www.senlime.org/Info/Lasta.zip>

**«Esperanto en Marche»,
via Informilo de la Belga Asocio Por Esperanto
malfruas ...**

La informilo «Esperanto en Marche» denove aperas, sed laŭ pli-malpli ne antaŭvidebla ritmo, dum «*La Voĉo de Amikejo*» tute trankvile kaj regule plu aperas.

Ni bedaŭras ke ni ne povas antaŭvidi kiujn informojn estos komunikitaj al ĝiaj legantoj kaj kiam...

Memoru ke nia informilo estas libere elŝutebla (kaj reproduktebla) el nia retejo je la jena adreso :

<http://www.senlime.org/Info/Lasta.zip>



Niaj programeroj lupee

detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,...

Ĝenerala asembleo

Vi estas invitataj ĉeesti la ĝeneralan asembleon de *Senlime* kaj E.G.V., okazonta en B-Kelmis (Select, Lutticherstr. 264), la 21an de septembro, de la 20a ĝis la 22a horo, kun jena tagordo :

- oficialigo de la membro-listo
- starigo de la ĉeestantara listo
- kontrolo de la mandatoj
- raporto de la ĝenerala sekretario
- raporto de la kasisto
- jura aprobo de la komitato
- estonta agado de Senlime/EGV
- (re)elekto de la komitatoj
- diversajtoj

Ni rememorigas al vi ke nur kotizinta membro rajtas voĉdoni kaj kandidatiĝi kiel komitatano.

Membro kotizinta kaj malhelpata ĉeesti rajtas doni skribitan mandaton al alia persono.

Ĉia temo povos estis pritraktita fine de la asembleo, post aŭ kadre de la «diversajtoj» sed la ĝenerala sekretario rajtas mallongigi la debatojn pro manko da tempo.

Bonvenon al ĉiuj !

La registro enhavanta la oficialajn dokumentojn de *Senlime* kaj E.G.V. estos konsultebla de la (kotizintaj) membroj en la sidejo de la asocio *Senlime*, str. J. Wauters 5, BE-4800 VERVIERS

09-21 20h00 BE-Kelmis, Select: **Ĝeneralaj asembleoj de Senlime kaj E.G.V.**

Inf. jacques@senlime.org

Mongolio

Mongolujo, ĉe la orienta fino de la stepoj de Centra Azio, for de ajna maro, estas juvelujo por stepoj kaj arbaroj, foraj montoj kaj aridaj ebenaĵoj. Vi tie vojaĝas dum tagoj sen renkonti iun ajn vivanton.

Vojaĝante per ĉevalo aŭ tuttereneta veturilo tra la grandegaj distancoj de tiu altebenaĵo, oni povas vidi antilopojn, lupojn, sovaĝajn ĉevalojn, poefagojn, kamelojn, lagojn centope, izolitajn vilaĝojn, varmajn yurtajn tendarojn, la Siberian tajgon kaj la dezerton Gobi.

Enkonduke al tiu lando da paŝtejoj kaj profundaj arbaroj, ni revidu la filmon *Urga* de **Mikhailkov**, relegu *Dersu Uzala* de Vladimir **Arsenyev**, konatiĝu kun ĝia historio dank'al *La Imperio de la stepoj* de René **Grousset**, kaj sonĝu kun *Lupo mongola* de **Homeric**. Ĉar se Mongolujo estas tiel bela, estas danke al ĝiaj enloĝantoj. La natura kaj kultura heredaĵo mongola estas riĉa kaj antaŭgardita.

La mongola lingvo estas aglutina lingvo kiu apartenas al la grupo de altajaj lingvoj.

Post la displitiĝo de Sovetunio kaj ĝia planita ekonomia sistemo, Mongolujo malrapide liberiĝis kaj iele trovis sian lokon en la monda ordo kapitalisma...

10-19 20h00 BE-Kelmis, Select: "Vojaĝo en Mongolio", prelego de Marcel **Delforge**.

Inf. delforge@senlime.org

Esperanto 125-jara

Trankvile kaj diskrete, la esperantista mondo festis, tiun 26-an de julio 2012, la 125-an datrevenon de la naskiĝo de esperanto, tio estas fakte de la «*Unua Libro*» de Zamenhof, enhavanta la unuan prezenton de la lingvo kaj bazan vortprovizon.

Kompreneble, la festoj fakte multobliĝas en ĉiuj lokaj grupoj. *Senlime* kaj la esperantista grupo de Verviers ne volis maltrafi la okazon kaj preparis tri eventojn en Verviers :

- **Trilanda Renkontiĝo** la 28-an de oktobro: gisado de sonorilo okaze de la 75a datreveno de la kariljono de la preĝejo «Nia-Damo» en Verviers (kaj koncerto far' kariljon-lernantoj el Valonujo).

- **Publikaj projekciadoj**, por ne-esperantistoj, de la filmo «Esperanto» de Dominique **Gautier** en Verviers kaj Kelmis, kun posta debato pri esperanto (datoj kaj lokoj decidotaj).

- **Zamenhof-festo** en Verviers, la 16an de decembro, kun kristnaka koncerto en la preĝejo «Nia-Damo».

Vi trovos la (malfeliĉe tre provizorajn kaj do verŝajne modifendajn) programojn de la Trilanda Renkontiĝo kaj de nia Zamenhof-festo sur nia paĝo 5.

Bonvolu poste informiĝi kaj estu bonvena en Verviers !

ESPERANTO

Eŭregiona kalendaro 2012-2013 (1/2)



Senlime publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Luticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie Jacques (jacques@senlime.org).

07-20 15h00 BE-Kelmis,
Select: **Amikeja promonado**,
gvide de loka esperantisto.
Inf. jacques@senlime.org

08-17 15h00 BE-Kelmis,
Select: **Amikeja promonado**,
gvide de loka esperantisto.
Inf. jacques@senlime.org

09-21 20h00 BE-Kelmis,
Select: **Ĝeneralaj asembleoj de Senlime kaj E.G.V.**
Inf. jacques@senlime.org

10-19 20h00 BE-Kelmis,
Select: "Vojaĝo en Mongolio",
prelego de Marcel **Delforge**.
Inf. delforge@senlime.org

11-16 20h00 BE-Kelmis,
Select: "Esperanto-vortaro-programo",
prelego de Bernd-Rainer **Lauber**.
Inf. lauber@senlime.org

12-16 10h30 BE-Verviers,
Zamenhof-festo de **Senlime**.
Inf. jacques@senlime.org



Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, la: **12-21, 01-18, 02-15, 03-15, 04-19, 05-17 kaj 06-21.**

20-07 15h00 BE-Kelmis,
Select: promenade en Amikejo,
guidée en espéranto.
Inf. jacques@senlime.org

17-08 15h00 BE-Kelmis,
Select: promenade en Amikejo,
guidée en espéranto.
Inf. jacques@senlime.org

21-09 20h00 BE-Kelmis,
Select: **Assemblée générale de Senlime et E.G.V.**
Inf. jacques@senlime.org

19-10 20h00 BE-Kelmis,
Select: "Voyage en Mongolie",
conférence de M. **Delforge**.
Inf. delforge@senlime.org

16-11 20h00 BE-Kelmis,
Select: "Logiciel-dictionnaire-espéranto",
conférence de Bernd-Rainer **Lauber**.
Inf. lauber@senlime.org

16-12 10h30 BE-Verviers, Fête
Zamenhof de **Senlime**.
Inf. jacques@senlime.org



Autres réunions au Select à BE-Kelmis, les: **21-12, 18-01, 15-02, 15-03, 19-04, 17-05 et 21-06.**

Novaĵoj pri **KELMIS-AMIKEJO**

(el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

La Park-Hotelo malfunkcias

Ni memoru ke temas pri hotelo taŭgaranĝita en la iama domo de la direktoro (favora al esperanto) de la iama zink-minejo en Neŭtrala Moresneto.

La hotelo ĝuas pri centra situacio en Kelmis (tre proksime de la Select, nia nuna kunvenejo kaj iama kultur-centro de Amikejo).

La hotelo bankrotis kaj la kuratoro elektis novan hotelestron laŭdire fidindan. Fakte, tiu-ĉi tute ne prizorgas la konstruaĵon kaj nur foj-foje malfermas la restoracion. La germanlingva komunumo jam forprenis la hotelan siglon.

Nu, la komunumo laŭ kontrakto longdaŭre ludonis la hotelon al la antaŭa administranto, kondiĉe ke li regu la hotelon kaj la restoracion.

La urbestro, Mathieu Grosch, do opinias ke la nuna administranto ne respektis la kontrakton kaj petas la tribunalon nuligi ĝin.

Intertempe (kaj eble longtempe ĉar la belgaj tribunaloj estas tre malrapidaj) la urbo Kelmis ne plu havas hotelon...

Feliĉe restas la ebleco loĝi en Aachen (nur 8 km for kaj buse atingebla), Vaals...

N-B : En Verviers, la sola hotelo (prave nomita "Hotel Verviers") prosperas kaj eĉ antaŭvidas pligrandiĝon de 100 al 160 ĉambroj (ve - por ni, malriĉaj esperantistoj - kvarstelaj kaj multekostaj!).

Dulanda renkontiĝo (sen esperanto)

Unu fojon jare (nur), la urbaj konsilantaroj de Vaals (NL) kaj Plombimonto (BE) kunvenas por ĵeti pontojn inter la du urbetoj.

Kiam Jean-Paul Kompier (Plombimontano) proponis kunigi la enloĝantojn por unu festa kaj turisma tago, ne estis hezito kaj interkonsento tuj estis trovita.

La 27an de majo 2012, du turismaj busoj foriris, unu el Plombimonto, la alia el Vaals, kaj transiris la landlimon.

Tiu el Vaals haltis ĉe la Muejejo de Terbruggen, la bierfarejo "Grain d'Orges", la Muzeo pri la hejmgrundo [Musée du Terroir], la Domo de la Minejo kaj la Usona Tombejo.

La buso el Plombimonto haltis ĉe Vaalsbroek, Kopermolen, kastelo Bloemendal, Vijlen (plej alta vilaĝo en Nederlando: 220 m!) kaj fine en restoracio "Kubo Libera".

Estas notinde ke, ve, la du grupoj nur vespere mallonge kuniĝis por ebligi al nederlandanoj kaj belgoj renkontiĝi kaj preparoli (per kiu lingvo?) la okazintan "dulandan renkontiĝon".

Esperantistoj vojaĝas per la sama aŭtobuso kaj alparolas unu la alian per la sama lingvo... Kaj ili ankaŭ invitas alilandanojn, ĉu ne? Ili eĉ renkontiĝas pli ol unu fojon jare!

Ekzemplo komunikinda...

Vojaĝemuloj

David Schmets el Plombimonto kaj Isabelle Lejeune el Aubel donis al si ses monatojn por trairi la Andan montaregon per tandem.

Ili foriris tiun 16an de julio por vojaĝo da 7000 km kiu bicikligos ilin tra landoj kiel Ekvadoro, Kolombio, Peruo, Kostariko, Bolivio, k.t.p.

Reveninte, ili lanĉos sin en alian aventuron: plezurekskurso dum ses pliaj monatoj en Azio. En la programo: Hindio, Birmo, Vjetnamo, Laoso, Kamboĝo, k.t.p.

Jen eble taŭgaj kandidatoj por kreota titolo de «Honoraĵ esperantistoj»!

Muzika *Senlime*

En Esperanto-Centro (Esperanto-Ĝardeno) de Herzberg am Harz, je la 26a de julio 2012 (ĵaŭdo, de la 17a ĝis la 20a horo) okazis jubilea festeto okaze de la 125-jariĝo de nia lingvo.

Surprize, en la programeroj ni povis legi: memfarita gulaŝaĵo, babilado, koncerto de la muzikgrupo "*Senlime*" (kantoj en Esperanto kaj en la germana)...

Ve, ni ne konas tiun (novan?) grupon sed kompreneble plaĉus al ni legi kaj precipe aŭdi pri ĝi...

Kiu raportos?

Jean-Marie **Jacques**,
ĝenerala sekretario.

Trilanda renkontiĝo kaj Zamenhof-festo en Verviers

Kariljono estas sonorilaro ebliganta melodian ludon pli-malpli etenditan kaj varian laŭ la nombro de sonoriloj, 23 minimume por koncerta kariljono, helpe de klavaro(j).

Do, humila sonorilisto fine iĝas virtuozo, eĉ improvizanto, okaze de festoj aŭ koncertoj.

La filmo «**Bonvenon che la Ŝti-oj**» favorigis novan kariljonan modon, sed koncertaj kariljonoj ekzistas ankaŭ ekstere de la franca urbo **Bergues** kaj de niaj flandraj urboj : ekzistas ankaŭ 22 da ili en Valonujo, inter kiuj 4 en la Lieĝa provinco.

Vervierso posedas la sian, kun 40 sonoriloj, en la preĝejo «Notre-Dame des Récollets» (foto dekstre). La responsaj ludantoj estas Marie-Madeleine **Thonnard** kaj Gauthier **Bernard**. Oni povas aŭdi ilin kadre de la «aŭtunaj dimanĉoj», ĉiam en oktobro.

Jam de pluraj jaroj pasia teamo revivigas tiun belan verviersan heredaĵon : purigado, necesaj riparoj, kaj, regule, organizado de koncertoj kaj kariljonaj vizitoj... Plue, ili volas taŭge festi la 75an datrevenon de ĝia konstruo. Jen ilia resumita programo :

7-an de oktobro je la 15a horo: Fabrice **Renard** (Lieĝano), kun ĥorgrupo kaj dancistoj.

21-an de oktobro je la 15a horo: Gauthier **Bernard**, kun la harmonio «Eĥoj de la rivero Berŭin» (el Aubel).

28-an de oktobro: gisado de sonorilo okaze de la 75a datreveno kaj koncerto far' kariljon-lernantoj el Valonujo.



Trilanda renkontiĝo

Verviersaj esperantistoj simpatias kun la sonorila amikaro kaj decidis ne nur partopreni la eventon, sed ankaŭ inviti la najbarajn esperantistojn por iom speciala trilanda renkontiĝo en Verviers, la 28an de oktobro.

Provizora programo :

Malfermo de la akceptejo je la 10a horo (restoracio «Le jardin de Provence», 85 rue du Brou, en Verviersa centro)

10h30 : vizito al la urba centro kaj sonorila gisado

12h00 : tagmanĝo

14h00 : sonorila koncerto

15h00 : vizito de la urba muzeo pri Belartoj (strato Renier 17)

17h00 : kafo kaj torto-peco.

Aliĝo bonvolu antaŭpagi la sumon da 30 EUR (partopreno + manĝo), NUR al la konto 979-5327148-10 de **Senlime** (p.6).

Klare menciu la celon de via pago, kiu **nepre** alvenu plej malfrue la 19-an de oktobro : ĝi ebligas vian partoprenon (aliĝilo ne necesas – repago neeblos).

Zamenhof-festo

La 16an de decembro, «la sonorilo de la 75a datreveno» estos benita en la preĝejo Nia-Damo, je la 18a horo, kadre de diservo en la franca lingvo (ni vane proponis esperanton...). Do (tamen) la Verviersa Esperanto Grupo invitas vin al Zamenhof-festo en Verviers.

Provizora programo :

Rendevuo en la centra stacidomo je la 10h30 por promenado tra la urbo aŭ je la 11h30 en la restoracio «Le jardin de Provence» por la aperitivo.

12h00 eta bankedo

14h15 foriro al sonoril-koncerteto piede de la preĝejo «Nia Damo»

15h00 kristnaska koncerto en la preĝejo far la harmonio el Aŭbel.

17h00 fino de la Z-festo, sed tiuj, kiuj tion deziras, povos ĉeesti la benon de la sonorilo kaj la diservon.

Aliĝo bonvolu antaŭpagi la sumon da 40 EUR (partopreno + manĝo), NUR al la konto 979-5327148-10 de **Senlime** (p.6).

Klare menciu la celon de via pago, kiu **nepre** alvenu plej malfrue la 7-an de decembro : ĝi ebligas vian partoprenon (aliĝilo ne necesas – eventuala repago principe neeblos).

N-B: por ambaŭ oranizaĵoj ni dependas de la «**Komitato de la 75a datreveno de la kariljono**».

Jean-Marie **Jacques** rete (per la yahoo-grupoj kaj la ttt-ejo de Senlime) komunikos al vi la ĝisdatigitajn informojn kaj la definitivan programon kiam eblos.

Dankon pro via komprenemo!

Verviersa **A**ngulo

Verviersa **E**spéranto **G**ruppo

Le parcours d'intégration

En Wallonie comme en Flandre ?

Comité de V.E.G.:

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour
l'Espéranto (A.P.E.)
Jean-Pol Sparenberg
20 Ruelle de Thuin
6540 LOBBES
Tél. 071/59.15.42

Cotisations

Les espérantistes et sympathisants
sont cordialement invités à soutenir
notre programme d'action en versant
chaque année une ou plusieurs des
cotisations suivantes au compte

979-5327148-10

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de **Senlime**, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.

La cotisation de **Senlime** est
obligatoire et fixée à 10 EUR. Ce
bulletin d'information est intégré à la
revue «Espéranto en marche»,
comprise dans la cotisation à APE.

D'avance, merci à tous !

A.P.E. 2012 (EGV) 25 €

U.E.A. 2012 (MA-T) 61 €

Senlime (cotisation 2013) **10 €**

Indiquez les nom, prénoms et
domicile du membre cotisant ainsi
que l'association bénéficiaire:
«cotisation de.... pour....».

*En quoi consiste précisément le
parcours d'intégration - déjà
obligatoire en Flandre et - que
certains voudraient copier/coller
chez nous ?*

Une distinction est faite entre un
parcours d'intégration civique
primaire et un parcours
d'intégration civique **secondaire**.

Le parcours d'intégration civique
primaire comprendrait

- un cours d'**orientation sociale**:
c'est une première rencontre
avec la société wallonne et
belge. Une offre standard
d'orientation sociale dure **60
heures** (+ travail à domicile).

Le participant peut suivre les
cours dans sa langue maternelle
ou dans une langue de contact
(**espéranto** ?). Les cours sont
dispensés soit dans la journée,
soit le soir ou le week-end.

- un cours de base de **français
deuxième langue** (niveau NT2):
les personnes peu scolarisées
ou '**lentes à l'apprentissage**'
sont orientées vers un centre
d'éducation de base. Un cours
standard se compose de **240
heures** (+ travail à domicile,
imaginez la charge!).

Les personnes plus scolarisées
ou qui apprennent vite peuvent
se rendre dans un centre
d'éducation des adultes, où elles
peuvent suivre un cours
standard de **120 heures**.

Les **intégrants** qui souhaitent
entamer des études supérieures
et qui satisfont à la condition
d'admission de l'enseignement
supérieur peuvent participer à un
cours de **90 h.** maximum. Ces
cours sont organisés par des
centres universitaires.

Pour les **intégrants** analphabètes
ou très peu scolarisés, un
parcours NT2 se compose de
600 heures de cours (*sic*).

*Pour moi, espérantiste, il n'est
pas juste d'obliger quelqu'un à
apprendre une langue étrangère
(que ce soit l'anglais ou toute
autre langue 'nationale'...)* !

- l'**orientation** de carrière : il
s'agit de l'accompagnement
dans la recherche d'emploi ou
d'études et dans l'offre culturelle
et de loisirs.

- un **accompagnement** de
parcours individuel.

Le parcours d'intégration civique
que suivra un **intégrant** est fixé
dans son **contrat** d'intégration
civique. Celui-ci comprend les
cours qu'il suivra ainsi que
quand et où ils auront lieu. Il est
tenu compte au maximum de la
situation de travail et de famille,
des besoins d'apprentissage et
des questions des intégrants.

Une personne qui signe un
contrat d'intégration civique
s'engage à suivre régulièrement
le programme de formation. Cela
implique que l'intégrant doit
participer à **au moins 80%** de
tous les cours lors de chaque
partie du programme de
formation. Il reçoit alors une
attestation d'intégration civique
et peut entrer directement dans
le parcours d'intégration civique
secondaire, au cours duquel il
devra concrétiser les choix qu'il
a faits (Il peut travailler ou suivre
des **cours complémentaires de
français-deuxième langue** et
poursuivre ses études).